NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
☎: 94.416.44.92
💻: tepgaitj@lg.ehu.es aŭ esperantobilbo@lettera.net

E-kursoj: Vendrede
Kunvenoj de la sociaro: Vendrede.
Estrar-kunvenoj: 1-a vendredo de ĉiu monato
Eliro al "Nova Placo": 1-a dimanĉo de ĉiu monato

Jar-kotizo: 2.500 pesetoj/15 eŭroj **BBK-konto: 22-1800155-0**

MARTO/APRILO 1.999

ĈIUJARA ĜENERALA KUNVENO.

Ĝi okazos la **vendredon 30-an de Aprilo**, ekde la 7-a kaj duono vespere, laŭ la sekva tag-ordo:

1. Legado kaj aprobo, se indus, de l'akto pri la antaŭa ĝenerala kunveno.
2. Same pri la en- kaj el-spezoj dum la jaro 1.998.
3. Same pri la buĝet-propono por la jaro 1.999.
4. Informoj far de la estraro.
5. Elekto de nova estraro.
6. Demandoj kaj sugestoj.

Noto: Tiuj, kiuj dezirus kandidatiĝi al kiu ajn posteno en la estraro, povas tion oficialigi per simpla informo al la nuna Sekretario, Alberto García Orive, antaŭ ol la komenco de la kunveno.

VIERNES 30 DE ABRIL, A LAS 7,30, ASAMBLEA GENERAL. ¡ACUDE!. TU PARTICIPACION ES MUY IMPORTANTE.

PAGO DE CUOTAS.

Si a la izquierda de estas lineas ves una "X", es porque aun no has pagado la cuota de soci@ correspondiente al pasado año de 1.998. Te recordamos que puedes hacer el ingreso, de 2.500 pts., en la BBK, en el número de cuenta que figura en el encabezado de esta circular.

Así mismo, rogamos que el pago de la cuota de soci@ de este año, sea realizado cuanto antes pues ello redunda en un claro beneficio para el Grupo.

LASTE...

La Bilbao-a Urbodomo konstante kaj senlace persekutas nian Asocion. Antaŭ 4 jaroj oni monpunis nin pro gluado de afiŝoj sur la stratmuroj; ni jam forgesis pri la afero kaj eĉ eblis legi sur la lokaj ĵurnaloj ke tiaj punoj estis kontraŭleĝaj. Spite de tio, antaŭ nemulte alvenis atentigletero, per kiu minacas nin konfiski ian posedaĵon kaj tiamaniere nuligi nian "ŝuldon". Ni informos pri la rezulto de ĉio ĉi.

GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO
Jaro 1.998-a

ENSPEZOJ.

Jarkotizoj	192.000	(+ 19.500)
Loteri-profito (20% de 381.000)	72.600	(- 3.600)
kurs-kotizoj	55.000	(+ 55.000)
Mon-donacoj	30.600	(+ 11.695)
Interezoj	15.141	(- 7.689)
Vendoj de esperantaĵoj	12.555	(+ 480)
Donaco de la loteri-vendisto	3.600	(- 200)
SUMO	**381.496**	(+ 69.888)

ELSPEZOJ.

3-a (kaj lasta) redono de obligacioj (60%)	444.000	(+ 292.000)
Najbarara komunumo	40.000	(- 16.000)
Rubaĵo	41.590	(+ 1.934)
Telefono	21.590	(+ 1.334)
Akvo	17.933	(+ 1.413)
Imposto pri la domo	17.235	(+ 354)
Dom-asekuro	16.597	(+ 4.190)
Pres-kosto de la loteri-kvitancoj	14.000	(+ 4.000)
Poŝtmarkoj por sendi cirkuleroj	12.209	(+ 6.239)
Interezo de la obligacioj (2%)	8.880	(- 3.040)
Aĉeto de libroj	8.320	(+ 8.320)
Elektro	8.077	(- 606)
Kovertoj	3.550	(+ 3.550)
Manĝaĵoj kaj trinkaĵoj	3.262	(+ 2.240)
Fotokopioj (cirkuleroj)	2.572	(+ 1.492)
Loterio ludita de la Grupo	1.500	(+ 300)
Arĥiv-libroj	1.500	
Gluado de afiŝoj por la novaj kursoj	500	
Bendo por la tajpilo	450	
SUMO	**663.765**	(+ 199.798)

SALDO JE LA 31-12-1998

Saldo je la 31-12-1997	475.602
Enspezoj 1998	381.496
Elspezoj 1998	663.765
NOVA SALDO JE LA 31-12-1998	**193.333**

PODETALE.

Kaso	-2.135
Konto BBK (22-1800155-0)	114.736
Konto BBK (22-1800183-2)	4.681
Invest-Fonduso "Baskefond FIM" (97-1016987-6)	76.051
SUMO	**193.333**

GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO

Buĝet-propono por la jaro 1.999-a.

ENSPEZOJ.

Kotizoj (90% de 194.000)	175.000
Loteri-profito	70.000
Novaj kursoj (6 x 5.000 pts)	30.000
Vendoj de esperantaĵoj	10.000
Aliaj	15.000
SUMO	**300.000**

ELSPEZOJ.

Rubaĵo	45.000
Najbarara komunumo	32.000
Telefono	25.000
Sendado de 6 cirkuleroj (6x115x30)	20.700
Akvo	20.000
Aĉeto de libroj	20.000
Imposto pri la domo	18.000
Dom-asekuro	18.000
Presado de la loteri-kvitancoj	15.000
Elektro	10.000
Abono al revuoj kaj aliĝoj al E-organizoj	10.000
Aliaj	16.300
SUMO	**250.000**

Saldo je la 31-12-1998	193.333
Enspezoj dum 1.999	300.000
Elspezoj dum 1.999	250.000
SALDO ESPEREBLA JE LA 31-12-1999	**243.000**

MALLONGE.

* La nuna Prezidanto de Hispanio, S-ro. **José María Aznar**, akceptis la Honoran Prezidantecon de la "58-a Hispana Kongreso de Esperanto" kaj de la "9-a Eŭropa Esperanto-Forumo", kiuj okazos en Castellón, de la 17-a ĝis la 21-a de Julio. (inf. A. Casquero).
* La **forumo** alt.esperanto.principiante, uzata ĝis antaŭ nemulte de hispanaj esperantistoj, estis anstataŭata de alia, kies nomo estas Agora, kaj trovebla ĉe http://www.ciudadfutura.com/esperanto/tablo.htm (tia estis la propono de José F. Martín).
* Danke al laboro de nia samideano Sabin Orueta, la E-Grupo de Bilbao havas **novan e-poŝtan adreson**, tiel kiel vi povas legi ĉe la frontopaĝo de tiu ĉi cirkulero. La nova adreso same validas kiel la antaŭa; do, memoru ambaŭ: tepgaitj@lg.ehu.es
esperantobilbo@lettera.net

Nia nova adreso troviĝas ĉe http://www.ciudadfutura.com, kie eblas ĝin havi senpage. Aliaj E-Grupoj povas eventuale profiti tiun cirkonstancon.

PROGRESIGA KURSO.

Ĉiuvendrede, de la 7-a kaj duono ĝis la 9-a, gvidata de Santiago Martín, okazas progresiga kurso de Esperanto ĉe nia sidejo. Ĝia ĉefa celo estas paroligi esperante tiujn, kiuj, post la akiro de lingvoscio, ne kuraĝas ekparoli. Vi ĉiuj estas bonvenaj.

Samtempe, daŭrigas la elementa kurso, gvidata de Iñaki Vélez.

PROPAGANDA TABLO EN LA "PLAZA NUEVA".

Daŭre ni starigas informigan tablon (kun libroj kaj revuoj) pri Esperanto en la "Plaza Nueva" ("Nova Placo") de Bilbao, **la unuan dimanĉon de ĉiu monato**, apud la sidejo de "Euskaltzaindia". Kaj daŭre ni bezonas volontulojn por ĝin prizorgi. Ĝis nun, preskaŭ nur niaj samideanoj Iñaki Vélez kaj Santiago Martín pri ĝi okupiĝis, sed ili ne malesperas pri alveno de kunlaborantoj. Ĉu vi mem?.

NACIA LOTERIO.

Kiel tradicie, **fortuno ne trafis nin** okaze de la lasta kristnaska hispana lotumado. Tamen, ni volas danki la sindonemon de ĉiuj, kiuj rabis parton de sia libera tempo por disvendi niajn belegajn kvitancojn (tute esperantigitaj) kaj tiamaniere helpis (ete, sed helpis) al subtenado de nia E-rondo.

Ankaŭ ni volas tre speciale danki al tiuj eksterbilbaoanaj geesperantistoj, kiuj petis la sendadon de kvitancoj al siaj urboj por ludi kune kun ni. Kaj por la venonta kristnasko, nur unu peton: **ne atendu ĝis la lasta momento por fari viajn mendojn: jam de oktobro eblas ilin fari**.

SOCIARO.

Dum la jaro 1998-a, estis jenaj ŝanĝoj ene de la sociaro de la E-Grupo de Bilbao:

EKSIS: ALONSO VILLEGAS, Lucas (1-Jun.). Ne pagis kotizojn.
ARRUABARRENA GOIKOETXEA, Arkaitz (1-Jun.). Ne pagis kotizojn.
BENGOETXEA ASUMENDI, Ignacio (1-Jun.). Ne pagis kotizojn.
GUTIERREZ PEREZ, Albino (1-Jun.). Ne pagis kotizojn.
MASSARRAT SAIAN, Vafa (7-Nov.). Malaperis.
MATES LUQUE, Jose Manuel (1-Jun.). Ne pagis kotizojn.
MENDEZ VALDES, Fausto (1-Jun.). Ne pagis kotizojn.
PEÑAFIEL de la VEGA, Fernando (1-Jun.). Ne pagis kotizojn.
PINEDO VADILLO, Mª Angeles (1-Jun.). Ne pagis kotizojn.
SAMPEDRO PEREZ, Daniel (29-Jun.). Mortis.

ALIĜIS: BARRIO PEREZ, Carlos. (9-Jan.).
VIÑA VARELA, José Manuel. (1-Jun.).

Je la 31-a de Decembro 1998-a, nia asocio nombris 80 anojn.

PAGO DE KOTIZOJ (1.999).

Jam komencis nova jaro kaj do estas tempo por pagi vian kotizon kiel ano de la E-Grupo de Bilbao. Pro tio ke ĝi ne plialtiĝis, restas la samaj kategorioj ol dum la pasinta jaro, nome:

Normala: 2.500 ptoj./15 eŭroj.
Eta: 2.000 ptoj./12 eŭroj (geemerituloj, gestudentoj, gesenlaboruloj, ...).
Familia: 4.500 ptoj./26 eŭroj (por la tuta homaro, kiu loĝas samadrese).

Tiuj kvantoj estas por la tuta jaro kaj eblas pagi per rekta enkontigo ĉe BBK (konto-numeron vi trovos en la unua paĝo, sub la titolo de tiu-ĉi cirkulero) aŭ en la Grupejo mem.

MALLONGE.

* UEA nomumis s-ron. Augusto Casquero, el Valencio, **novan ĉefdelegiton en Hispanio**. Tamen, ne sendu al li monon por pago de kotizoj aŭ aliaj servoj. Tiun taskon plenumas HEF en sia madrida oficejo.

* La nova **telefon-libro de Budapeŝto** (Hungario), sur la 15-a paĝo, inter la fremd-lingvaj ĝeneralaj informoj, aperigas ankaŭ tutkolumnan esperant-lingvan tekston (krom anglan, germanan, francan, italan kaj rusan).

* Por aliĝi al la **58-a Hispana Kongreso**, kiu okazos en Castellón inter la 17-a kaj la 21-a de Julio, estas tre favoraj kondiĉoj rilate monon, same pri la kotizo kiel pri la loĝeblecoj, nur ĝis la 1-a de majo. Do, ne forgesu pri ĝi kaj aliĝu kiel eble plej baldaŭ.

ESPERANTO-ARANĜOJ.

05-09 Marto. EOLA-11, Internacia Festivalo de E-arto. Kievo. Ukrainio.
e-poŝto: eola-kiev@esperanto.nu
http://www.gs707.com/esperanto/eola-11/index.html

31 Marto-06 Aprilo. 23-a Internacia Junulara Festivalo. Bellaria (Rimini). Italio.
e-poŝto: gcastelli@enjoy.it

03-10 Aprilo. 15-a Printempa Semajno Internacia. St. Andreasberg. Germanio.

05-10 Julio. 35-a Brazila Esperanto-Kongreso. Campo Grande. Brazilio.

17-21 Julio. 58-a Hispana Kongreso de Esperanto. Castellón. Hispanio.
e-poŝto: a-casquero@redestb.es

17-23 Julio. Internacia E-Konferenco de Osiek pri "Mono kaj Civilizo". Metz. Francio.
e-poŝto: ericl@iname.com
http://osiek.org


24-31 Julio. 72-a Kongreso de SAT. Karlovy Vary. Ĉeĥio.
e-poŝto: chrdle@telecom.cz
http://www.worldnet.net/~sat-esp

31 Julio-7 Aŭgusto. 84-a Universala Kongreso. Berlino. Germanio.

09-16 Aŭgusto. 55-a Internacia Junulara Kongreso. Zánka. Hungario.

22-25 Aŭgusto. 2-a Azia E-Kongreso. Hanajo. Vjetnamio.

ISSN 1341-3996
novembro, 1998
n-ro 22



Riveroj
interkultura revuo en esperanto

Redaktoro: (s-ro) Mine Yositaka.

Riveroj **interkultura revuo en esperanto**

Eldonita en Japanio. Precipe enhavas beletraĵojn kaj eseetojn, verkitaj **nur** de aziaj samideanoj. Formato: 21 x 15 cm. 50 paĝoj.

- "Riveroj" aperas 4 fojojn jare.
- Jara abono por 4 numeroj: 2400 enoj.

Eldonejo Riveroj (=Yosikawa Syôiti)
Oosaka-si, Tyûô-ku, MorinomiyaTyûô 1-9-18-403,
540-0003 Japanio.

- Abonebla ankaŭ ĉe:
UEA, Rotterdam, Nederlando: (30 ned. gld.)

Rekomendoj de la Konsultejo de la Akademio de Esperanto.

La konsulta komisiono, ricevinte demandojn pri la ĉi-subaj vortoj, rekomendas:

* Por "inline skates": unuvicaj rulŝuoj; rulŝuo, jam vaste uzata, estas ŝuo kun radetoj aranĝitaj unu- aŭ duvice.
* Por "snowboard": glit(o)tabulo / neĝtabulo; unuobla skio, sur kiu starante ambaŭkrure oni glitas laŭ neĝa deklivo.
* Por "halfpipe": duontubo; tiuforma instalaĵo por pendole veturi en ĝi per rultabulo.
* Por "mountainbike": mont(o)biciklo / montarbiciklo; fortika biciklo taŭga por veturi sur natura kaj dekliva tereno (terenbiciklo).
* Por "gameboy" (varnomo): ludkomputil(et)o; tiuspeca portebla aparateto kun ludprogramo, precipe por infanoj.

Krome oni demandis ĉu la terminoj "poŝtelefono" kaj "kompaktdiskilo" estas akcepteblaj. Tion la konsulta komisiono jesis, aldonante ke por portebla kompaktdiskilo sufiĉas kutime ankaŭ la termino "poŝdisk-ilo". La konsulta komisiono atentigas, ke tiuj ĉi rekomendoj ne estas decido de la Akademio de Esperanto. Lingvajn demandojn ĉiu povas direkti al la direktoro de la konsulta komisiono, Stefan Maul (maul@newsfactory.net).

(Rap. Pedro Ullate).

VOJAĜOJ AL HISPANA KAJ AL UNIVERSALA KONGRESOJ.

Se vi interesiĝas pri kolektiva vojaĝo al Hispana Kongreso (Castellón, 17/21 Jul.) aŭ al Universala Kongreso (Berlino, 31 Jul./7 aŭg.), per aŭtomobilo, ne dubu: demandu en la Grupejo al Jesús kaj ĉiuj kune pritraktos la eblecon organizi ilin.

MONTAR-EKSKURSOJ.

Ĉu inter viaj hobioj estas ekskursi al montaro?; se jes, jen vi havas la eblecon samtempe sporti, koni niajn belegajn ĉirkaŭaĵojn, amikiĝi al novaj homoj kaj, plejĉefe, praktiki Esperanton for de klasejo. Ni jam piedpremis kelkajn pintojn kaj nun atendas vian partoprenon. Ha!, ne timu: certe vi ne laciĝos, ĉar nur sufiĉe ebenaj vojoj estos trairataj. Informiĝu ĉe la Grupejo.